Internaciaj Ekzamenoj | Specimeno
**Skriba parto** | **Meza nivelo**

Poentoj: 100 | Sukceslimo: 60% | Tempodaŭro: 3 horoj

## 1. Lega kompreno

**Legu la sekvan tekston kaj respondu la demandojn post ĝi.**

La nuna generacio vivas en ĥaoso. La ideologio de la prauloj parte kompromitis sin dum la mondmilito kaj seniluziigitaj posteuloj ĵetas sin en la marĉon de teorioj por trovi elirvojon. Diversaj doktrinoj, fungomaniere kreskantaj, malgraŭ la bonvola intenco pli-malpli venenas la sanan evoluon. Ilian bonvolon karakterizas naiveco kredanta, sed senpova. Dume la adeptoj de la antaŭmilita mondpercepto ekipas sin je preparo de nova milito. Ĉu intence, ĉu senkonscie ili faros tion, estas egale. Certe la gvidantojn instigas facile konstatebla egoismo, spasma alkroĉiĝo al la potenco; la plimulto estas ja surda kaj blinda por aŭdi kaj vidi la sonojn, fenomenojn de nova epoko, kies perspektivojn ne povas precize skizi eĉ la plej vigla fantazio. La malico ŝtelas sin en la pacajn hejmojn sub masko de la paco, ekvilibrata per milionoj da bajonetoj.

Vole-nevole la meditanto vidas, ke la homaro dancas super senfundaj abismoj kaj en tiu ĉi terura mortodanco sur la ŝnuro, Eŭropo, alivorte la "blanka raso", prenis al si la primadonan rolon. Ni, simplaj homoj, ĉiamaj viktimoj de potenculoj, baraktas sub premo de la ĝeneralaj krizoj ekonomia kaj morala. Nia rezistemo, muelita kaj fintorturita, ne povos sukcese kontraŭstari en tiu momento, kiam la monstro de la milito denove kaj tre baldaŭ ektrumpetos alarmon por la furioj de la teruro. Sed tiam ... Ve al vi, egoistaj potenculoj kaj narkotita amaso kaj ve al vi, senpovaj idealistoj, ĉar ankaŭ vi pereos kun ili. La komunan neston detruos via malprudento; ĝiajn loĝantojn ekstermos la sangavida frenezo. La hodiaŭa pacifismo, eĉ la plej sincera, ŝajnas esti nur ŝafblekado en la uragano.

Sur la horloĝo de la historia tempo la montriloj baldaŭ atingos la dekduan. Sufiĉas jam la belaj frazoj, predikataj preskaŭ ĉiam al niaj adeptoj, kiuj eĉ sen tio estas pacemaj! Necese estas jam agi racie, celkonscie kaj persiste! Por krei daŭran pacon ni uzu la armilojn de la prudento homa kaj ni estu veraj pioniroj, kreantaj la ponton super la abismo! Rememoru, ke la kreopovo de la Homo jam venkis la teron, maron, konkeris la aeron kaj nun ĝi celas al malproksimaj astroj! Kaj tamen hodiaŭ la vojaĝo al la Luno ne ŝajnas tiel utopia, kiel la atingo de la tutmonda paco kaj interfratiĝo de la popoloj. Por venki la maron, aeron kaj teron, oni devas subpremi, subpotencigi tiujn fenomenojn, kiuj dum longaj jarcentoj kontraŭstaris al la aspiroj de la progresanta homaro. Same en la batalo por la paco, oni devas subpremi kaj senpotencigi tiujn faktorojn, kiuj malhelpas la veran progreson. 'Ne venki ni volu, sed konvinki', ĉar en la ĝenerala konvinkiteco kaŝiĝos la triumfo de la homa homo, kiu estas la lumo de dio sur la tero. Antaŭ ol venki la spacon en la universo estu venkita en ni ĉio, kio rememorigas pri la ŝtonepoko, pri la pugnorajto. En la milito kontraŭ la milito batalu por siaj rajtoj la spirito, celanta harmonian kunlaboron, ĝeneralan kulturŝaton, koran homamon kaj pacan estontecon."

(El *Ĉu militon aŭ pacon?* de Julio BAGHY)

**TASKOJ**

**A. Trovu <u>en la teksto</u> sinonimojn de:**

a. devigite …………………. e. venkoi …………………………….
b. sen aŭdkapablo …………………. f. pereigi ………………………………
c. batalilo …………………. g. malpinto …………………………….
ĉ. kontraŭstari …………………. ĝ. pretiganto de sukceso al novaj ideoj
d. potenculoj ………………….. …………………………….

9 poentoj)

**B. Respondu la sekvajn demandojn**

a. En tiu teksto la aŭtoro aŭguras la duan mondmiliton? Citu tri faktojn el la teksto mem por ilustri, ke ĝi estis verkita inter 1918 kaj 1939.
b. Kian bildon BAGHY prezentas pri la potenculoj, kaj kian pri la pacifistoj?
c. Kial estas tre trafa la fermo de la dua alineo per la metaforo "ŝafblekado en la uragano"?
ĉ. Per kiuj esprimoj ligiĝas la tria alineo al la dua? Donu argumentojn al via respondo!
d. Kiajn pensojn enkondukas la vorto "pioniro"?
e. Per kiuj esprimoj BAGHY prezentas sian epokon?

(21 poentoj)

## 2. Eseo

*Elektu unu el la sekvaj kvar temoj kaj verku 600-vortan eseon pri ĝi.*
*La Ekzamena Komisiono aljuĝas po dek poentojn por lingva ĝusteco, idea enhavo kaj stilo.*

a. Toleremo, ĝis kiuj limoj?
b. Edukado por la 21-a jarcento.
c. Kiel plej bone informi pri Esperanto?
ĉ. Esperanto kaj la monda paco.

(30 poentoj)

## 4. Aŭskulta kompreno

*La kandidato devas aŭskulti du sonbendigitajn aŭ laŭtlegatajn tekstojn. La tekston unu el la ekzamenantoj legas dufoje je proksimume 100 vortoj minute. La kandidato ne rajtas vidi la tekstojn, kvankam ĉi tie estas prezentata specimeno en skriba formo.*

*<u>Pri la unua teksto</u> la kandidato devas respondi demandojn per plenaj frazoj kaj doni tiom kompletajn respondojn kiom eble. La demandojn eblas legi antaŭ la aŭskultado.*

**VIRUSOJ EN KOMPUTILOJ**

Jam ekde jaroj ni aŭdas kaj legas de tempo al tempo pri komputilaj krimoj. Ofte estas publikigitaj informoj pri iamaj dungitoj, kiuj klopodas venĝi al sia laborejo pro la maldungo per "bomboprogramoj", eksplodantaj eble nur jaron post sia kreo kaj kaŭzantaj enorman perdon de gravaj informoj, eĉ funkcian kaoson en la komputilsistemoj. Ni konas ankaŭ kazojn, kiam lertaj programistoj penetris en bankajn sistemojn kaj ĝiris monon al la propra konto. Multaj el la programoj uzitaj kaj uzataj tiucele fakte estas virusoj: programoj, kiuj, enirante sistemon, kapablas infekti la komputilon kaj/aŭ aliajn programojn en la sama sistemo.
Eĉ plurajn sistemojn povas minaci unusola viruso: jam ekzistas komputilaj retoj grandaj kiel lando; kelkaj el tiuj retoj fakte transiras landlimojn. Oni povas sendi tiajn programojn tra telefonaj kaj aliaj retaj kanaloj, infektante milojn da komputiloj eĉ sen forlasi la hejmon.
La jam menciitaj kazoj estas konsiderataj kiel krimoj laŭ ĉiuj leĝaroj de la mondo. Sed estas eblecoj kaŭzi ne malpli grandajn problemojn al la komputilaplikantoj sen esti punitaj: la leĝaro de la komputike subevoluintaj landoj ne donas eblecon persekuti tiun tipon de virusoj, kiu ŝajnas esti la plej disvastiĝinta en tiuj landoj: programeroj, kiuj intencas "puni" la uzantojn, se oni uzas piratan kopion (t.e. kontraŭleĝe kopiita programo, akirita ne de la produktanto; same kiel ĉe tradiciaj sonregistraĵoj). Kvankam intence kaŭzi neripareblajn damaĝojn en softvaro kaj hardvaro estas sabotado, la ekzistantaj leĝoj povas nenion fari kontraŭ la argumentado de la fiprogramistoj: "Ni neniam intencas damaĝi iliajn komputilojn. Kial oni ne aĉetis de ni la programon?".

**DEMANDOJ**

a. Kiujn celojn povas havi komputilaj krimoj?
b. Kio estas komputila viruso, kaj kiel ĝi agas?
c. Kiel eblas infekti komputilojn?
ĉ. Kio estas "pirata kopio"?
d. Kial ne ĉiuj komputilaj infektoj estas kontraŭleĝaj?

(10 poentoj)

*<u>La dua tasko</u> estas aŭskulti la aldonan tekston pri la sama temo kaj <u>resumi ĝin</u> en ĉirkaŭ 150-200 vortoj. La kandidato rajtas aŭskulti la tekston dufoje kaj rajtas fari notojn dum la aŭskultado. Estas kvinminuta paŭzo inter la du aŭdigoj, dum kiuj la kandidato rajtas eklabori.*

Tiu manko en la leĝoj ebligas utiligi virusojn por protekti la interesojn de tiuj softvarentreprenoj. Kaj ĝuste en malpli evoluintaj landoj (pro la malfacila akireblo de internacie konataj programoj aŭ pro ilia relative alta prezo) pleje ekzistas la pirata kopiado: fakte iaspeca komunumo de samfakanoj, kie ĉiu donas al la alia, kion li havas. Tiu fakto endanĝerigas amason da komputiloj kaj komputilaj retoj.
La viruso ĉiam funkcias nevideble, nur la rezultojn oni povas "ĝui" - ja viruso, kies efikmanieron kaj programon oni povas senprobleme lokalizi kaj ekzameni, fakte eĉ ne estas viruso, nur iaspeca truko destinita por nefakuloj.

La viruson ĉiam alportas alia programo (ni notu, kiel bele analogas biologiaj kaj komputikaj terminoj). Eble oni pretigas la programon mem nur por porti la viruson. Sed eĉ en tiu kazo la programisto certe donas ian funkcion al ĝi por kaŝi la veran celon. La programo povas esti ia ajn, povas havi ajnan funkcion: tekstoprilaborilo, datumbaztraktilo, simpla helpprogramo, ktp. Aldone, virusoj, kiuj kapablas multobligi sin, ĝenerale infektas aliajn programojn, ofte eĉ ĉiujn aliajn programojn. Tiel la infekto disvastiĝas kiel epidemio kaj dum mallonga tempo tiel infektiĝas amaso da aliaj sistemoj, precipe se unu el ili estas ero de komputila reto.
Se tia viruso aktiviĝas - ja ne ĉiuj komencas tuj detruadi, kelkfoje ilia aktiviĝo dependas de eksteraj kondiĉoj, ekzemple paso de difinita tempodaŭro, iomfoja uzo de la programo aŭ deekstera startsignalo - ĝi povas kaŭzi diversajn problemojn.
Iom pli mildaj estas tiuj virusoj, kiuj ne kapablas reprodukti sin. Tiajn uzas firmaoj, kiuj provizas siajn programojn per protekto kontraŭ pirata kopiado. En la plej senĝena formo tia viruso faras nenion alian ol, kondiĉe ke temas pri pirata kopio, simple malebligi la uzadon de la programo, kaŭzante nenian damaĝon. Se la firmao volas "puni" tiujn aplikantojn, ĝi jam uzos la plej danĝeran viruson (eĉ se tiu ne reproduktas sin). Kvankam multaj - kaj programistoj kaj nefakuloj - apenaŭ kredus, ia programo povas kaŭzi neripareblan damaĝon al hardvaro. Kompreneble, ĝi povas minaci ankaŭ la softvaron. Ekzemple, per la traskribo de unusola bajto de disko oni povas malebligi la denovan formatigon kaj pluan uzadon. Kvankam la disko fizike ne damaĝiĝas, tamen neniu povos denove uzi ĝin sen koni tiun unusolan etan ŝanĝon - kaj se la virusfaranto tiun ne publikigas, oni havas nur unu ŝancon: verŝajne la programo, kiu storas ĉiujn gravajn partojn de la disko ankoraŭ antaŭ la eblo de infektiĝo, povos poste restarigi la komencan staton, eble la programoj perdiĝos, sed la komputilo ne.
Se programisto uzas tian viruson, li aŭ ŝi estu tamen minimume tiom honesta, ke lia programo menciu tiun fakton al la aplikanto kaj ebligu al la aplikanto rezigni pri la uzo de la pirata kopio sen minaci la sistemon.
Ekzistas ankaŭ pli "agrabla" tipo: virusoj, kiuj volas "dekutimigi" la aplikanton. Tiuj virusoj ne damaĝas, nur malhelpas la uzadon de la protektata programo per lertaj trukoj.

**Resumu la aŭditan tekston en 150 200 vortoj.**

(10 poentoj)

## 5. Kulturaj konoj

*Plenigu la spacojn en la sekvaj frazoj per taŭgaj informoj:*

a. La unua Universala Kongreso de Esperanto okazis en la jaro ________ en la urbo___________________.

b. La fondinto de Universala Esperanto-Asocio estis _________________, kiu loĝis kaj aktivis en la urbo ___________.

c. "Izolo" kaj "Streĉita kordo" estas verkoj de __________________.

ĉ. Unesko unuafoje akceptis rezolucion pri Esperanto en la jaro ______ en la urbo _________________, rezulte de la interveno kaj agado de ___________________.

d. Du gravaj kulturaj centroj por esperantistoj estas_____________________ kaj ___________________.

e. La poezia grupo "Kvaropo" devenas el la lando ____________________.

f. "La perfekta civitano" kaj "Maŝinmondo" estas verkoj de ___________________.

g. La Ido-skismo eksplodis en la jaro _______- kaj unu el la ĉefaj instigantoj de ĝi estis ___________________.

ĝ. Nuntempa verkisto eldoninta almenaŭ kvar romanojn estas __________________.

h. _____________________ estas nuntempa Esperantista kantisto.

i. Andreo CSEH kaj Istvan SZERDAHELYI estis elstaraj Esperantistaj ______________.

j. "La infana raso" estas verkita de ____________________.

(20 poentoj

**La solvojn de la testo** nia redakcio povas sendi al vi en aparta retmesaĝo, se tion vi petas de la redaktejo je la adreso : katalin@ikso.net

Bv. klare indiki la solvojn de kiu testo vi bezonas.